

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Min kaptas malgaj' en la koro,  
pro kio tia trist'?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trunkvilas,  
malhelas jam la Rejn'.  
La monto surpinte brilas  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
si kombas harojn el or'.

Si kombas per ora kombilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

Ŝipisto ŝipeton gvidas,  
lin kaptas ve' de ekzalt'.  
Li ja la rifojn ne vidas',  
li vidas nur supren sen halt'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita  
malgaj' en la koro naskiĝis;  
el tempo jam enterigita  
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,  
la Rejno mallaŭte babilas,  
per oro de l'sun' en vespero  
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:  
en ora ornamo brilante,  
sur supro de l' monto ŝi sidas,  
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
kaj kantas tra l' pura aero,  
kaj forto mirinda sin trovas  
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,  
ŝipisto ektremis de l' kanto,  
kaj blinda por ĉiu dangero  
rigardas li al la kantanto.

...

Heinrich Heine,  
The Lorelei

*tradukita de L. W. Garnham*

I do not know what it signifies.  
That I am so sorrowful?  
A fable of old Times so terrifies,  
Leaves my heart so thoughtful.

The air is cool and it darkens,  
And calmly flows the Rhine;  
The summit of the mountain hearkens  
In evening sunshine line.

The most beautiful Maiden entrances  
Above wonderfully there,  
Her beautiful golden attire glances,  
She combs her golden hair.

With golden comb so lustrous,  
And thereby a song sings,  
It has a tone so wondrous,  
That powerful melody rings.

The shipper in the little ship  
It effects with woe sad might;  
He does not see the rocky slip,  
He only regards dreaded height.

...

Mi kredas, ke ondoj tiras  
la ŝipon funden de l' Rejn';  
kaj tio de l' kant' eliras  
de Lorelaj-siren'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela  
perdiĝis sub l' akvoturnado;  
gin Lorelej' faris kruela,  
per sia mirinda kantado.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhof, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo  
<http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

I believe the turbulent waves  
Swallow the last shipper and boat;  
She with her singing craves  
All to visit her magic moat.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.*

Arg-2-14 (2003-10-11 23:04:57)

*L. W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHEINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leibzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880*